

LENIN KAJ ESPERANTO

Okaze de la centjaro de la naskigo de Lenin verkis

Ulrich Lins

Mitoj kaj faktoj pri la rilato de V. I. Lenin al la Internacia Lingvo cirkulas jam plurajn jardekojn. Post nia publikigo de "rememoroj" de Ints Ĉaĉe (en 1969), estis eble funde re-ekzameni ĉiujn disponeblajn informojn, opiniojn kaj onidirojn. La detale dokumentita, nova studo de Ulrich Lins (ĉef-redaktoro de la nova Enciklopedio de Esperanto) kredeble fariĝos la definitiva fonto pri tiu temo.

eblas supozi tie rektan influon aŭ iniciaton de Lenin. Estas same dubinde, ke en printempo 1918 la rusaj esperantistoj jam pensis pri tia agado. En tiu periodo de nestabileco kaj maltrankvilo, kiam eksterlandaj potencoj komencis invadi Ruslandon, Esperanto apenaŭ povis atendi seriozan pritrakton.

Pli kredindan ateston, nome ke Lenin eĉ ne pensis pri Esperanto dum la unuaj postrevoluciaj monatoj, liveris la posta urbestro de Stockholm, Karl Lindhagen. Okaze de akcepto ĉe Lenin en januaro 1918 li demandis: "Ĉu oni povas esperi, ke la rusa registaro volas perfektigi la revolucion per propono ĉe la pactraktadoj kaj en sia ekstera politiko agi, por ke per internacia interkonsento estu akceptata monolingvo, devige lernota en ĉiuj lernejoj de la mondo?" Lenin respondis: "Ni jam havas tri monolingvojn kaj la rusa iĝos la kvara." Laŭ Lindhagen, Lenin "tute ne kredas je artefarita lingvo kaj argumentis same kiel homoj, kiuj ne okupiĝis pri la afero"⁸.

Kontraŭdiroj

Tamen baldaŭ, komence de 1920, diavastiĝis inter okcidentaj esperantistoj la onidiro, ke la sovetrusa registaro decidis enkonduki Esperanton kiel devigan instruobjekton en ĉiujn lernejojn. (La Popola Komisarejo por Klerigo efektive nur establis komisionon por studi tiun eblecon, kaj Lunaĉarskij en majo 1920 permesis fakultativan instruadon de Esperanto, egalrajte kun la franca, germana kaj angla.) La bluojn de kelkaj trofervoruloj dementis Maandblad juli-aug. stuk 6

la sovetaj gazetaro fine de 1921: "Opinii la lingvon Esperanto, kiel internacian lingvon, inda de ekskluziva registara atento, estas nun antaŭtempo."⁹

Sur miskompreno do baziĝas ankaŭ la aŭtora dediĉo al Lenin. "protektanto de Esperanto", skribita en la broŝuro "L'espéranto. Langue auxiliaire, neutre internationale" de Léon Méras (Paris 1922), kiu estas listigita en katalogo de la libraro de Lenin kiel sola esperantajo.¹⁰

La veran situacion en la unuaj jaroj post la Revolucio kredeble trafe priskribis (en 1923) la ĉino Bao Pu, kiu studis en Moskvo: "La bolŝevikoj ne atentis problemon de internacia lingvo, nur pro tio ke ili ne ricevis ordonon de Lenin. Mi ĉiam disputis kun multe da bolŝevikoj. Ili ofte respondis al mi per sekvantaj vortoj: 'Kial Lenin ne pensas pri Esperanto?'"¹¹ Kaj Lucien Laurat, kiu vivis en Moskvo de 1923 ĝis 1927 kaj estis membro de Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, skribis al ni: "La sovetaj esperantistoj de tiu tempo neniam faris al si iluziojn pri la sinteno de Lenin rilate al Esperanto. Li certe ne estis absolute malamika (laŭ ĉio, kion mi scias, li simple malententis Esperanton kiel utopiaĵon), ĉar en tia kazo neniam Béla Kun estus kuraĝinta intertrakti kun

4 "Life and death of Lenin", New York 1964, p. 209-210
5 Fakte lernilo de Ido, de Anton Waltisbühl (Zürich 1908)
6 Camille Huysmans, Internacia sekretario de la Brusela Internacia Socialista Oficejo, kiu multe korespondis kun Lenin, favoris Esperanton.
7 Ankaŭ Drezon kaj Devjatnin neniam skribis pri laŭ laŭ paŝoj de Lenin favore al Esperanto.
8 Citajoj laŭ "Sennaculo", 6, 1929/30, p. 211
9 "Sennacieca Revuo", 3, 1921/22, n-ro 5, p. 9
10 "Biblioteka V.I. Lenina v Kremle. Katalog." Moskva 1961, p. 650 (n-ro 8033)
11 "La Verda Lumo", (Sanhajo) 3, 1923/24, p. 8

En la numero de februaro 1969 (p. 24-27) ni publikigis "rememorojn" de Ints Ĉaĉe pri renkontiĝoj kun Lenin; en ili la fondinto de Soveta Unio prezentiĝas kiel simpatianto de Esperanto. Tiun artikolon, kiu aperis sub la respondeco de la aŭtoro, sekvis neordinare vigla reeŝo de legantoj, tiel ke nun — okaze de la centjaro de la naskiĝo de Lenin — ni povas resumi ĉiujn konatajn faktojn kaj argumentojn.

Pluraj legantoj atentigis, ke la asertoj de Ĉaĉe ne estas fidindaj, sed antaŭ ol prilumi tion, necesas konsideri, ĉu per la aperigo ni riskis — kiel riproĉas s-ro Keable (apr. 69, p. 66) — "ion, kio povas embarasi la laboron por Esperanto en Sovetio". Efektive, ne ni unuafoje disvastigis la informojn de Ĉaĉe: Post liaj prelegoj antaŭ esperantistoj en Tallinn kaj la Akademio de Sciencoj en Leningrado, en novembro kaj decembro 1957, pluraj orienteŭropaj gazetoj, ne nur Esperantaj, disvastigis liajn asertojn, i.a. 'Nuntempa Bulgario', 'Zprávy', kaj 'Pola Esperantisto' (1-2/68) kredante "prezenti tute novan dokumenton, kiu preskaŭ sensacie atestas interesiĝon de Lenin" pri Esperanto. Ĉar en 1959 eĉ Soveta Informa Oficejo konigis dirojn de Ĉaĉe pri Lenin¹, ni celis per kritike komentita represo diskutigi pri la vero de asertoj, almenaŭ parte jam delonge akceptitaj de multaj esperantistoj.

☆

El du studentoj, kiuj en 1887 estis forpelitaj el la universitato de Kazan pro socialista aktiveco, unu, V. I. Uljanov, poste fariĝis revoluciulo sub la nomo Lenin, kreante la unuan prolet-kampanan ŝtaton; la alia, Sergej Feodoroviĉ Poljanskij, agadis por Esperanto (ĝis sia morto en 1935) kaj fondis en 1899 Esperanto-societon en Ĥabarovsk, la unuan en ekstrema oriento. La vojoj de ambaŭ ŝajne ne plu interkruĉiĝis, sed ni vidu, ĉu kaj ĝis kia grado estiĝis rilatoj inter Lenin kaj la Esperanto-movado.

Lenin en Krakovo

Pri la tempo antaŭ 1912 ne ekzistas eĉ onidiroj pri la temaro "Lenin kaj Esperanto". Sed, laŭ Ĉaĉe, en tiu jaro li deklaris dum la 8a UK en Krakovo, ke "Esperanto estas la latino de proleto".

Detala esploro havigis nenian pruvon por tiu eldiro². Kvankam Lenin troviĝis dum la kongresa semajno en Krakovo aŭ en Poronin, lia vivo tie estis tiel kaŝa, izolita kaj suspekteme observata de la aŭstraj aŭtoritatoj, ke ĝis 1913 li faris nenian publikan prelegon en tiu urbo.

Tamen, ni scias pri liaj regulaj kontaktoj kun almenaŭ unu elstara socialisto-esperantisto en Krakovo, d-ro Boleslaw Drobner, unu el la gvidantoj de la loka komitato de Pola Partio Socialdemokrata (PPSD) kaj vicprezidanto de la Krakova Asocio por Helpe al Politikaj Malliberuloj. En tiu asocio, kiu ebligis la restadon de Lenin en Krakovo, kunlaboris pluraj polaj kaj rusaj esperantistoj, i.a. prof. Odo Bujwid, kaj probable Lenin okaze renkontiĝis kun kelkaj el ili. Sed neniu transdonis iajn informojn, ĉu kaj kiel Lenin pensis pri Esperanto. Drobner, kiu pli frue renkontis Lenin jam en Svislando kaj kunorganizis la socialistajn programerojn de la 8a UK, certe estus menciinta en siaj memuaroj ĉeeston de Lenin, kaj ankaŭ en la detala raporto de 'Internacia socia revuo'³ ne troviĝas aludo pri partopreno de elstara rusa rifuĝinto. Oni povas nur konjekti, ke Lenin eksciis pri la granda publika kunveno de socialistoj esperantistaj kaj neesperantistaj, organizita de PPSD la 15an de aŭgusto 1912 kaj partoprenata de dumil homoj, aŭ pri la esperantlingva broŝuro 'Politika malliberulo', eldonita de la menciita asocio okaze de la Kongreso.

Kvankam s-ino Maria Hessel, vivanta en Krakovo de post sia infanaĝo, memoras, ke delonge ŝi aŭdis pri la vortoj de Lenin, ni ne povas konfirmi ilin, ĉar onidiroj, kiel konate, tre persiste konserviĝas tra la jardekoj.

Mitoj kaj faktoj, 1913/14

Laŭ informo de Instituto pri Marksismo-Leninismo en Moskvo, kiu nomis la materialojn de Ĉaĉe tute senbazaj, Lenin deklaris en prelego en Bern (somere 1913): "La revoj pri la arta kreo de internacia universala lingvo, de ia Esperanto aŭ Volapük,

1. "Paco", vol. 5, 1959, n-ro 64/65, p. 5
2. La sekvantaj informoj ni dankas unuavice al Marian Kosteckí, Krakovo
3. Vol. 6, 1912, p. 105-108

estas utopio. La lingvo de la estonta socio ne estos artefarita." Kiel fonton la Instituto indikis memorojn de Didrikil (1924).

Ĉirkaŭ tiu sama tempo, se oni kredus al Robert Payne⁴, Lenin serioze interesiĝis pri Eo, petante per leteroj al li "Elizabet K." alsendon de 'Kompleta lernolibro por esperantistoj'⁵ kaj poste interrilatante kun esperantistoj en Zürich. Fonto de tiu ĉi aserto estas "memoroj" de la anonimulino, kiuj aperis en 1936 en Parizo, sed baldaŭ estis senmaskigitaj de iamaj kunbatalintoj de Lenin kiel ekstreme kruda falsajo. Kion ili kolportis per la elpensita amikino de Lenin, la esperantistoj sekve povas kalkuli al sia kolekto de kuriozaĵoj.

Niajn dubojn pri la informo de Ĉaĉe, ke Lenin uzis Esperanton en Brusela Konferenco en 1914, ni jam siatepe esprimis. Ni aldonu, ke la Instituto Emile Vandervelde, Bruselo, esploris en 1958, laŭ peto de SAT, siajn arkivojn kaj konkludis, ke Lenin uzis Esperanton dum neniu kongreso de la Dua Internacio⁶.

Post la Revolucio

Ni transiru al tio, kion Ĉaĉe nomas propraj travivaĵoj. Li asertas, ke kiel teknika redaktoro de 'La aglanto' kaj 'Petrograda informilo' li ĉeestis en 1918 gazetarajn konferencojn kun Lenin. Sed efektive 'La aglanto' ekaperis, cetere dusemajne, nur en 1921, kiam Lenin delonge ne plu estis en Petrogrado; gazeto 'Petrograda Informilo' laŭ nia scio neniam ekzistis, dum ja tie aperis, sed same nur de post 1921, 'Esperanta informilo'. Pro la sama kialo la "historia renkontiĝo" de Drezon, Devjatnin kaj Ĉaĉe ne povis okazi en aprilo 1918 en Petrogrado, ĉar jam la 11an de marto la registaro transloĝiĝis al Moskvo⁷. Por substreki nian ĝustigon ni citu el letero de Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Latviaj Esperantistoj: "Kelkaj samideanoj el Leningrado, kiuj estis tie samtempe kun I. Ĉaĉe kaj bone memoras la tiamajn okazintaĵojn, intencis sendi al la redakcioj de niaj ĉefaj gazetoj averton pri la agado de I. Ĉaĉe."

Dum estas fakto, ke en junio 1921 okazis en Petrogrado la 3a Tutruslanda Esperanto-Kongreso (kun 160 delegitoj) kaj ke rusaj esperantistoj lanĉis internacian helpkampanjon por malsatuloj, ne

(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

ni esperantistoj pri ev. rekono fare de Komin-tern¹².

En rememoroj de Isaj Dratwer¹³ denove aperas la nomo de Lenin en ligo kun Esperanto. Dratwer renkontiĝis en vintro 1919-20 kun A. Postnikov, kiu prelegis pri sia projekto de "Universala Ligo" kaj montris numeron de 'Izvestija', enhavantan ordonon de Lenin pri "fondo de eksperimentaj internaciaj kolonioj fare de la Universala Ligo kun oficiala lingvo Esperanto". Konfirmon pri tio ni trovis nek en la laboristaj Esperanto-revuoj nek en 'Esperanto' de UEA, kiuj ĝenerale zorge registris Esperantajn eventojn en Soveta Ruslando kaj ja menciis registaran dekreton en Izvestija¹⁴ pri la disponigo de — ne longviva — Domo Esperanto al moskvaj esperantistoj. (Oni notu cetere, ke Postnikov, laŭ Drezon, fondema "aventuristo", poste estis arestita kaj kondamnita pro "ŝtatperfido".)

Alian epizodon raportis la hungara veterano Sándor Szathmári (mortinta; ne identa kun la verkisto!), kiu en 1925, deŝorante en Moldavia, renkontis eksterlandan esperantiston "kun letero propramane subskribita de k-do Lenin, en kiu li rajtigas tiun k-don disvastigi Esperanton en Sovetunio".¹⁵

Laŭ Drezon, kontraŭe, la oficiala subteno al Esperanto inter 1917 kaj 1921 limiĝis nur al kelkaj "administrataj decidoj kaj agoj de lokaj ŝtataj kaj politik-partiaj aŭtoritatoj",¹⁶ kaj Gorkij, la intima amiko de Lenin, iom mistere supozis: "La unuajn jarojn post Oktobro ankaŭ ĉe ni oni provis malfermi larĝe la pordon al Esperanto. Sed ... io ekbremsis, iu ion ne prikonsideris, ien deflankiĝis."¹⁷

Nur post 1921, kiam fondiĝis Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU), la situacio komencis iom pliboniĝi, rapide kreskis la nombro de kursanoj, kaj de tempo al tempo la aŭtoritatoj subtenis la movadon, precipe inter 1925 kaj 1930. 'Pola Esperantisto' certagrade pravas, dirante: "Tutcerte pli frue en neniuj landoj Esperanto kaj esperantistoj estis tiel serioze kaj esperplene traktitaj, ol ĉi tio okazis en la gvidata de Lenin Sovetunio." Post la morto de Lenin la favoraj kondiĉoj daŭris ankoraŭ pli ol dek jarojn, ĝis sub la stalina personkulto, lige kun kreskanta malproksimiĝo disde Lenin kaj lia instruo, la Esperanto-movado estis komplete frakasita en 1937-38.

La edzino malfavoris

Ni ne scias, kian rolon ludis dum la disbato de SEU la opinio de Lenin, kia ĝi estis prezentita de liaj edzino kaj fratino, kvankam la deklaro de Drezon, citita de Keable, supozigas, ke ĝi almenaŭ en malfrua stadio malutile influis la juĝon de oficialaj instancoj.

Jam en 1923 la edzino de Lenin, N.K. Krupskaja, opiniis, ke "estas sencece elspezi tempon por enlerneja Esperanto-studado de infanoj", kaj en 1927 ŝi precizigis, ke "la provoj krei artefaritan

lingvon, similan al Esperanto, estas ekstreme naivaj kaj evidentigas la suprajn konceptojn pri tio, kio estas kulturo".¹⁸ Dum komence ŝi kredis, ke "la artefarita lingvo restos posedaĵo nur de malgranda homgrupo", en 1930 Krupskaja cedis: "En plej bona okazo ĝi (Esperanto) taŭgas nur por interrilatoj." Sed plue estis por ŝi apenaŭ imagebla, ke "homoj iam konvinkus en io unu la alian per Esperanto, ke junulo dirus siajn unuajn vortojn de l'amo al sia amatino per Esperanto, ke patrino kantus al sia ido lulkanton per Esperanto Internacian fratiĝon oni forĝas nur dum batalo, intimiĝas nur komuna batalo, sed ne artefarita lingvo."¹⁹

Ke Lenin pensis simile, kredigis lia fratino Maria Iljiniĉna en 1928: Lenin "plurfoje esprimiĝis pri Esperanto, nome tre malaprobe. Li trovis ĝin tro artefarita, tro simpligita, tro morta. Li nur esprimis la opinion, mallonge antaŭ lia malsaniĝo, ke necesus enkonduki ĝeneralan alfabeton, kio kompreneble estos farita post la revolucio. Estas konsilinde, ke la kamaradoj, argumentante favore al Esperanto, prefere ne apogu sin al Lenin, kies opinio pri tio estas al ili tute nekonata."²⁰

Se antaŭmilite inter esperantistoj oni diskutis pri la opinio de Lenin, oni ŝajne ne antaŭ-supozis, ke ĝi estis pozitiva: Ekz. dum la kongreso de la SAT-opozicio en Amsterdamo (1931) la ruso Herbert Muravkin frontis la demandon, ĉu Lenin estis kontraŭulo de Esperanto; li sciis respondi nur, ke li dubas pri tio ...²¹

Resume, ni povas konkludi, ke Ĉaĉe ne kontribuis al klarigo de la mistero, sed pligrandigis ĝin. (Ke en liaj "memoroj" restas pliaj dubindaĵoj, kun kaj sen rilato al Esperanto, ni menciis nur flanko) Kontraŭe, la plej multaj fontoj tute klare pravas, ke Lenin ĝenerale ignoris Esperanton kaj, ne studinte la problemon, tre verŝajne sentis antaŭjuĝojn kontraŭ la Internacia Lingvo.

Lenin kaj la lingva problemo

En la "Verkoj de Lenin"²² ne troviĝas mencio pri Esperanto²³ aŭ propono kiel solvi la mondan lingvoproblemon, sed el liaj ideoj pri internacia kulturo oni povas dedukti, ke li ne antaŭvidis en sia teorio lokon por internacia lingvo. Por Lenin internacia kulturo ne estis sennacia, ev. kun supernacia lingvo kiel esprimo, sed kombinaĵo de la proletaj kaj demokrataj elementoj de la unuopaj naciaj kulturoj; la batalo inter tiuj kaj la burĝaj

elementoj okazas per la lingvo de la respektiva nacio. Dum nacia kulturo pli frue esence restis burĝa kulturo, la proletaro devas ĉion subteni, kio detruas la barojn inter la popoloj kaj kio kondukas al la — libervola — kunfandiĝo de la nacioj, realiĝonta nur post tre longa tempo. eĉ ne tuj post la finvenko de komunismo. Lenin postulis, ke oni devas serĉi apogon ĉe la tuta proletaro, senkonsidere al lingvo kaj nacieco. Sed samtempe li emfazis, ke internacia edukado de la amasoj ne eblas sen la propagando por la rajto de subpremitaj nacioj je memdecido kaj je apartiĝo, kaj konsekvence necesas aparte akceli la lingvon kaj literaturon de laboristoj de antaŭe sklavigitaj popoloj.

Kvankam Lenin, almenaŭ ĝis 1917, neis, ke estas tasko de la proletaro evoluigi la naciajn kulturojn, li tamen ĉiam rigore montris al nepaciebla konflikto inter socialismo kaj nacia subpremo. Li sin turnis kontraŭ la deviga akceptigo de unu oficiala ŝtata lingvo, kies bezonon li kontestis, citante kiel modelon la konekzistadon de tri/kvin lingvoj en Svislando, kaj li koncesis al ĉiuj lingvaj grupoj la rajton pri lernejoj — tamen ne en la kadro de nacia-kultura aŭtonomio, sed sub la zorgoj de la centra registaro. Esprimante sin kontraŭ "ĝeto"-lernejoj*, li ne detaligis kiel en realo venki la malfacilaĵojn de plurlingva lerneja sistemo.


Neniu lingvo havu ian privilegion, skribis Lenin, kaj el tio ni rajtas konkludi, ke ankaŭ neniuj nacia lingvoj povus fariĝi LA internacia.⁴² Kiam neniuj lingvoj plu estos altrudata, la bezonoj de la ekonomio decidis pri la avantaĝo de tiu aŭ alia lingvo, kiun la homoj konsentos apliki. Tion dirante, li unuavice celis la estontecon de Soveta Unio (kaj sekve tiun de la rusa lingvo), malpli la situacion en monda skalo, en kiu li kredeble kalkulis pri longedaŭra apudekzistado de pluraj ĉeflingvoj.

Baziĝante sur la marksisma konvinko, ke ne necesas timi pri la ŝancoj de la rusa, ĉar la disvolviĝanta ekonomio, t.e. la kultura bazo, postulas ĝian lernadon kaj uzadon, Lenin povis restadi en absolute senkompromisa pozicio kontraŭ ĉia formo de rusigo perforta, kio certigis al li kiel potenculo grandan prestiĝon, des pli ĉar en 1922 li per fajraj vortoj deklaris militon al la "grandrusa ŝovinismo".

Tiun ĉi gvidlinion de Lenin, ke la rusa ŝovinismo plej multe minacas la venkon de komunismo, renversis Stalin de post 1934, traktante la naciajn malplimultojn kiel ĉefan danĝeron: Dekreto, kiu deklaris la rusan lingvon deviga fako en ĉiuj minoritataj lernejoj, estis publikigita en marto 1938, kiam furiozis ankaŭ la persekutoj al Esperanto.

Se mankas konkreta indiko pri aparta simpatio de Lenin al Esperanto, historie pli gravas, ke sub lia regado la internacilingva movado multpromese ekfloris en Soveta Unio, ke la evoluo de la Esperanta kulturo, en la kadro de la laborista Esperanto-movado, ne estas imagebla sen la fekunda kontribuo de sovetaj esperantistoj kaj ke estas ne eble pravigi subpremon de tiu vivanta Esperanto, nek kiun ajn lingvan diskriminacion, per sinapogo sur teorioj de Lenin.

Jen kiel Lenin en 1920, postulante dungitajn interpretistojn en ĉiuj armeaj ĉefstaboj, telegrafis ĝuste al Stalin: "Se temas pri la lingvo, necesas ĉia koncesio kaj maksimumo da egaleco."



Jam historia dokumento estas la ĉi-supra afiŝo, ŝajne el la jaro 1919, do nelonge post la oktobra revolucio. Ĝi difinas du kondiĉojn por efektivaĵo de la slogano "Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!": La unuan kondiĉon — liberiĝon de la proletoj el la subpremo — ekplenumis la oktobra revolucio. La duan — havigon de unu komuna lingvo de la proletoj — ekplenumis la publikigo de Esperanto en 1887. La afiŝon eldonis Domo "Esperanto" en Moskvo okaze de amaskunveno de laboristoj.

12. Kio havis nenian sekvon — krom fanfaronado de idistoj
13. "Heraldo de Esperanto", 38, 1962, n-ro 3, p. 2
14. 16/17-1-1919. Laŭ "Esperanto", 16, 1920, p. 32
15. "Hungara Vivo", 1963, n-ro 1; p. 12
16. E. Drezon: "Analiza historio de Esperanto-movado", Leipzig 1931, p. 88
17. "Bulgara Esperantisto", 38, 1969, n-ro 12, p. 3. — La publikigitaj tie (n-roj 10 kaj 12) "Novaj, nekonataj materialoj pri Maksim Gorkij kaj Esperanto" de Ilija Skapa montras la faman verkiston kiel konvinkitan adepton de Esperanto.
18. "Sennaciulo", 6, 1929/30, p. 296
19. "Komsomolskaja Pravda", n-ro 24, 30-1-1930; laŭ "Sennaciulo" 6, 1929/30, p. 253 N. K. Krupskaja: "Lenin pri lernado de fremdaj lingvoj". "Bulgara Esperantisto", 39, 1970, n-ro 3, p. 6-7.
20. "Raboĉe Krestjanskij Korrespondent", n-ro 21, 15-11-1928; laŭ la ekspertizo de Instituto pri Marksismo-Leninismo, Moskvo
21. "Kongreso de revoluciaj esperantistoj", Berlin 1931, p. 38
22. Dufoje oni reklamis por esperantlingva eldono de la Verkoj de Lenin: en 1932/33 en Germanujo, kie la planon flaskigis faŝismo, kaj en 1936 en Soveta Unio ...

23. En "La maldekstra radikalismo, infanmalveno en komunismo" li nomis la demandon de germanaj maldestruloj "Dikturo de la partio" aŭ "Dikturo de la amasoj": "la nekomprenebla, la nova Volapük".
24. Kp. "Esperanto", 61, 1968, p. 140-141
* "ĝeto" = juda kvartalo